# EKO 2025

Plia pola perdo

EKO 2025-45, November 30. Pezo: Word 40, PDF 500 KB, Sen alkroĉaĵo Sume 640 KB

## Pola elstarulo forlasis nin



La 13-an de novembro forpasis Roman Dobrzyński (1937-2025), pola ĵurnalisto kaj esperantisto, aŭtoro de multaj filmoj kaj libroj en kaj pri Esperanto, honora membro de UEA. Legu pli en *La Ondo de Esperanto* ĉe https://sezonoj.ru/2025/11/dobrzynski-2/

Omaĝe al la pollanda ĵurnalisto kaj esperantisto Roman Dobrzyński, ni proponas (re)legi lian (ne centprocente seriozan) membiografieton kun la titolo "La romano pri Romano", kiu okaze de lia 80-jariĝo aperis en *La Ondo de Esperanto* (2017, №11) kaj en nia novaĵretejo https://sezonoj.ru/2017/11/dobrzynski/

## ILEI preparas sin por la Zamenhofa Tago

ILEI proponas tekstojn por la komuna Internacia legado de la Zamenhofa Tago. Jen niaj proponoj por 2025, libere elŝuteblaj el nia retejo kaj faritaj kunlabore kun INK kaj Virina Agado. https://www.ilei.info/novajxoj/Zamenhofa-tago.ph

Alessandra Madella

## Studenta platformo Erasmus pri Esperanto

La celgrupo de tiu programo estas studentoj el eŭropaj universitatoj. La programo estas intensa hibrida programo ("Blended Intensive Programme"), kiu nomiĝas: "***Esperanto as an interdisciplinary field of transnational innovation***", kunorganizata de partneraj kolegoj el diversaj universitatoj.

La celo de la programo estas la studado pri la fenomeno Esperanto laŭ diversaj fakoj (lingvistiko, historio, filozofio, geografio, literaturo, ktp). La suma nombro de studentoj akcepteblaj en la programo estas inter 15 kaj 25 studentoj. La instrua lingvo estas la angla (nivelo B1 estas postulata). La programo havas distancan parton (de januaro ĝis majo 2026) kun instruado de Esperanto kaj enkonduko en diversajn temojn rilatajn al Esperanto, kaj surlokan parton, kiu okazos en la universitato de Tours (Francio) dum la unua semajno de junio 2026. La vojaĝo-kostoj estos financitaj de Erasmus, kaj la studentoj povos akiri 6 kredit-poentojn (ECTS) utiligeblajn por validigi en siaj propraj stud-diplomoj.

Kandidatoj povas esti studentoj el la tuta Eŭropo, el diversaj diplom-niveloj  kaj el iu ajn studfako. Ne necesas jam scii Esperanton antaŭ la programo (inverse, se kandidatoj jam parolas Esperanton, ili ne bezonos ĉeesti la enkondukan lingvo-kurson dum la unua parto de la programo). Bonvolu kontakti min: philippe.planchon@univ-tours.fr).

***Utilaj ligiloj:***

- Detala priskribo de la programo (retpaĝo de la universitato de Tours):

https://www.univ-tours.fr/medias/fichier/esperanto-bip-information_1760016824419-pdf?

- Instagram (F. Gobbo, universitato de Amsterdamo).

## Aktoj de ILEI konigitaj

*Fuel Magazine*, brita revuo por universitatanoj, amika al Esperanto, varbadis pri la Aktoj de la Simpozioj de ILEI 2022-2023 en sia Instagram-kanalo. Ili poste aldonis ankaŭ la kunligon al la retejo de la eldonisto Edistudio.

Alessandra Madella

## Pioniro el la biblioteko en Aalen forlasis nin

La 20-an de oktobro 2025 forpasis **Karl Heinz Schaeffer** (1942-2025), germana emerita apotekisto kaj esperantisto, afergvidanto de Germana Esperanto-Biblioteko en Aalen. Ni funebras kaj kondolencas. Legu nekrologon en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* ĉe https://sezonoj.ru/2025/10/schaeffer/.



## Invito al libra legado

La 96-a Sumoo komencĝis la 9-an de novembro dum 2 semajnoj. Mi atendas vian aliĝon por estontaj konkursoj:  http://www.esperanto-sumoo.pl/

HORI Jasuo

## Du-taga prezenta agado

La studenta klubo de Zaozhuang-a Universitato en Ĉinio estas partoprenanta en du-taga foiro de la kampusaj studentaj  asocioj kaj aktive prezentanta Esperanton per ludoj.

Alessandra Madella

## GeBenelukse penelukse

La Germana kaj Beneluksa Kongreso 2025, aŭ GeBeneluksa Kongreso, okazis komence de oktobro 2025 en Schleiden-Gemünd, meze de la Nacia Parko Eifel en Germanio kun ĉirkaŭ 150 partoprenantoj kaj riĉa programo, kiu enhavis, interalie, ekskurson al Moresnet – historia loko simbolanta la internacian idealon de Esperanto. Legu prian artikolon de Yves Nevelsteen en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* ĉe https://sezonoj.ru/2025/10/germanujo-40/



## Brazilaj ritmoj

Tiu ĉi estas komponaĵo verkita de **Flávio Fonseca** sur teksto de **Aglaia Souza**, kaj esperantigita de Flávio mem. Ĝi nomiĝas Tempeco. La originalo en la portugala estas *Temporalidade*, registrita de **Marianna Leporace** en la albumo *O Som da Poesia* (vi povas aĉeti la albumon ĉi tie):

## Cel-grupoj :por akiri lernantojn

1) studentoj kiuj povos partopreni la studprogramon, kompreneble.

2) ordinaraj homoj, kiuj havas malĝustahn ideojn pri Esperanto (aŭ nenian ideon pri Esperanto). Al tiuj, la artikolo de liberafolio.org povas montri ke Esperanto estas vera universitata studobjekto, ke lingvaj fakuloj zorgas pri ĝi, ke ĝi havas historion...

3) Mi timas iomete trian grupon, la grupon de esperantistoj, kiuj riproĉos la organizantojn de tiu studprogramo ke ĝi estos tro tia, maltro tia, ke la informoj estas nur en la angla.

Aŭtornomo perdita

## Kunpensigo universitata

La 65-a Kunpensigado de Esperantistaj universitatanoj okazis frue en novembro. Ĝi estis ĉefe dediĉita al Japanio kaj plenis je interesaj informoj kaj diskutoj. Kimura Goro prelegis pri siaj kursoj de Interlingvistiko ĉe la Universitato Sophia de Tokio. Pri unu kurso li verkis artikolon publikigitan en IPR. La alia havos interesan eksperimenton por vidi kiom multe da studentoj el Japanio kaj Ĉinio kapablas legi la respektivajn lingvojn eĉ sen studi ilin.
Tida Syuntaro prezentis sian instruadon de Esperanto ĉe la Universitato de Kumamoto kaj nun, kadre de kursoj pri lingvistiko, ĉe la Universitato de Kioto.
Aldone, Dennis Keefe parolis pri la avantaĝoj de saĝ-telefonaj bibliotekoj  kaj Ilona Koutny raportis pri sia fruktodona vojaĝo en Ĉinio, dum kiu ŝi donis sep universitatajn prelegojn angle kaj per traduko ĉine.

Alessandra Madella

## TEJO transprenas la taskon svingi la Eo-flagon

Renkontiĝis en Novjorko la membroj de CoNGO, la Konferenco de Neregistaraj Organizoj en Konsulta Rilato kun UN, por partopreni ties ĝeneralan asembleon. UEA venis al fino de sia mandato kiel estrarano de CoNGO (oni rajtas deĵori dum du trijaraj periodoj) kaj do eksiĝis el estraraneco. Feliĉe inter la kandidatoj por la nova estraro estis TEJO, kiu sukcesis elektiĝi kiel membro de la nova estraro. Gratulojn! Jen raporto de TEJO pri la elektiĝo:
https://www.tejo.org/tejo-en-la-estraro-de-congo/.

Tio signifas, ke la Esperanto-movado daŭre havos voĉon en prizorgado kaj fortigado de la neregistara sektoro en la aferoj de UN.

Humphrey Tonkin

## Progresiga ĉina kongreso

La 15-a Ĉina Kongreso de Esperanto sukcese okazis en Taiyuan, Shanxi-provinco pli ol 250 e-istoj partoprenis la kongreso kaj ĝuis la interesan etoson en tri tagoj, s-ro Yu Tao, vicprezidanto de la Ĉina Internacia Komunika Grupo fizike partoprenis la inaŭguron kaj salutis la kongreson, Jen la detalaj informoj:

http://esperanto.china.org.cn/2025-11/04/content_118159123.htm

http://espero.chinareports.org.cn/2025-11/04/content_118159139.htm

Ekspozicio de Eo-libroj okazis en Taiyuan

http://esperanto.china.org.cn/2025-11/04/content_118159215.htm

http://espero.chinareports.org.cn/2025-11/04/content_118159220.htm

**Seminario pri tradukado okazis en Taiyuan**

http://esperanto.china.org.cn/2025-11/04/content_118159342.htm

http://espero.chinareports.org.cn/2025-11/04/content_118159358.htm

-

## Samarkanda sukceso

La Ĝenerala Konferenco de Unesko en Samarkando: la tri-minutan paroladon de Mireille Grosjean, reprezentantino de Universala Esperanto-Asocio (UEA). En sia mesaĝo, ŝi klare prezentis la rolon de Esperanto kiel ilo por internacia kompreniĝo, edukado kaj kultura diverseco — valoroj plene kongruaj kun la celoj de UNESKO.

Ahmad Mamduhi

========= vortoj: 1120 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj
Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**Kvardek numeroj de 2025 aperis, kune kun la kvardek kvar numeroj de 2024**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.